

Eŭropa Bulteno

Oktobro 2015, Numero 153

INTERVJUO KUN CHUCK SMITH – ĈEFAŬTORO DE FURORA DUOLINGO E-KURSO



Chuck Smith kun la teamo de Duolingo

Bazaj statistikoj pri la kurso:

Esperanto el la angla:

- beta-versio lanĉita fine de majo 2015

- en oktobro 173.000 lernantoj en la kurso de Esperanto el la angla

Kursligilo: <https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online>

Esperanto el la hispana:

- starto: la 21-an de oktobro 2015

- 5% de la kurso jam kreita

- fine de oktobro 1551 gelenantoj jam antaŭaliĝis al la kurso

- beta-versio verŝajne lanĉiĝos en majo 2016

Kursligilo: <https://www.duolingo.com/course/eo/es/Learn-Esperanto-Online>

Kion vi, kiel aŭtoro kaj tiu kiu sekvas la evoluon, planas en estonto?

Mi ĝojas, ke ni ĵus sukcesis ekkrei la kurson de Esperanto el la hispana. En la kurso por anglalingvanoj ni nun prilaboras nian Arbon 2.0. Tio signifas, ke ni analizas la strukturon de nia kurso kaj provas restrukturi ĝin por ke pli da homoj restu por lernadi. Pri estontaj kursoj niaj venontaj planoj estas por Esperanto-kursoj el la rusa, ĉina, portugala kaj la franca. Por decidi pri novaj kursoj, estas multaj strategiaj konsideroj: Kiom da homoj jam lernas en tiu lingvo ĉe Duolingo? Kiom da homoj parolas tiun lingvon? Kiu estas la plej logika sekva paŝo? Ekzemple, plej facilus krei kurson el la portugala kiam la kurso el la hispana jam maturas.

Kion eblas fari por ke tiuj miloj plu lernu kaj ĉefe iel kontaktu la E-movadon: samaĝulojn kun kiuj ili simple povas paroli kaj interŝanĝi informojn pri kio ajn: ĉu kadre de duolingo ĉu ekster ĝi. Kiel eviti ke la granda plimulto restu je la nivelo atingita kaj neniel plu rilatu al la Movado?

Unue oni sciu pri la amplekso de la kurso. La kurso ĉe Duolingo ne nur estas por komencantoj, sed ankaŭ por progresantoj. Ekzemple, Ana Pana (la kurso por komencantoj ĉe lernu.net) instruas 250 vortojn. Nia kurso instruas 2000 vortojn (kaj ni planas instrui pli en la venonta versio), do apenaŭ kompareblas. Ni jam aŭdas multajn rakontojn pri homoj, kiuj ankoraŭ ne finis nian kurson, sed tamen jam ĉeestis Esperanto-klubojn aŭ -eventojn kaj parolis Esperanton la tutan tempon! Do, multaj el niaj kursanoj simple proprainciance trovas la komunumon mem.

Krome, ni multe informas en la oficiala forumo de Duolingo. Ekzemple en la "Esperanto mega post" (afiŝego pri Esperanto: <https://www.duolingo.com/comment/9139466>), ni havas multajn informojn pri diversaj temoj: klavaroj, kulturo, aliaj lernmanieroj, nia komunumo, Pasporta Servo, mapoj de esperantistoj, eventoj ktp. Krome, mi kompilis informojn por kursfinintoj "Finished the Esperanto tree, now what?" (Finis la Eo-arbon, nun kio?: <https://www.duolingo.com/comment/10334863>). Tiu havas informojn pri plua lernado, vojaĝado, muziko, radio, podkasto, filmoj, libroj, novaĵoj kaj organizoj.

Mi mem dum jardekoj okupiĝis pri komencantoj kaj unu el la aferoj kiujn mi ŝatus havi, estas facilaj legaĵoj, kiuj mankas sence ke la libroj estas adaptitaj al scinivelo de la lernanto (do, ilia vortprovizo). Ĉu vi havas iun ideon pri tio?

Iusence, niaj miloj da frazoj en nia kurso estas facilaj legaĵoj kaj 3000 el ili estis profesie voĉregistritaj en profesia studio en Parizo. Krome ĉiu frazo interne havas ampleksan liston de nacilingvaj tradukoj, do lernantoj povas ĉiam aktive testi sian scion kontraŭ nia listo. Pri longaj legaĵoj mi ne multe pensis, sed kredas, ke multaj aliaj esperantistoj jam okupiĝas pri tio.

Kiel atingi ke la duolinganoj iĝu TEJO-anoj?

Nu, ĉe Duolingo ni havas lernantojn de ĉiuj aĝoj, kvankam jes, ĉefe estas junuloj inter 18 kaj 25. TEJO multe engaĝiĝis kun ni pri tio kiel kunlabori, sed la plej grava obstaklo estas, ke Duolingo devas resti neŭtrala al ĉiuj organizoj, do ne volas kunlabori oficiale. Tamen, diversaj kulturaĵoj de TEJO aperas tra la kurso, speciale en la lanĉota lecionaro nomata Esperanto-Kulturo. Tiu ankoraŭ ne estis lanĉita pro teknikaj problemoj, sed ni esperas, ke ĝi baldaŭ aperos.

Parolante pri oficialaj organizoj, ni multe kunlaboras kun la Akademio de Esperanto. Anna Löwenstein multe kunlaboras por kontroli kaj helpi nian kurson. Krome, ni jam havas reprezentanton por la kurso por hispanlingvanoj. Mi ĝojus se tradiciaj organizoj pli interesiĝus...

Kiel vi vidas la evoluon poste?

Kiam ni lanĉis nian kurson, mi analizis la kursojn de la irlanda kaj ukraina, kiun mi opinias similgrandaj lingvoj kiel Esperanto. Tiam mi taksis, ke ni havus 200.000 lernantojn de Esperanto ĝis la jarfino. Nun kun 173.000 kursanoj kaj 500-1000 aliĝoj ĉiutage, ni ŝajne atingos tiun celon! Se nia kresko daŭros tiel, kun "nur" 500 novaj lernantoj ĉiutage, ni havos milionon da lernantoj en 2020, kaj tiu estas nur en la kurso de Esperanto por anglalingvanoj.

Krome, pli da homoj lernas la anglan el la hispana (49 milionoj) ol la hispanan el la angla (43 milionoj). Tio signifas, ke nia kurso por hispanlingvanoj eble estos eĉ pli populara ol tiu por anglalingvanoj! Mi ĉiukaze esperas, ke ni povos lanĉi novan kurson de Esperanto ĉiujare. Pri plua evoluo malfacilas taksi, sed unu afero certas: nia komunumo rapide evoluos kaj mi esperas, ke la "tradicia" movado pretas por la revolucio.

Intervjuis: Zlatko Tišljarić

DU NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE EEU

EEU starigis kategorion de honoraj membroj en 2006 kaj de tiam proklamis nur vere tre meritplenajn personojn kiel honoraj membroj (Etsuo MIYOSHI, Margareta HANDZLIK, Ljudmila NOVAK kaj Gerhard WALTER). Ĉi-jare la estraro decidis honori du plej aĝajn siajn estraranojn: Flory WITDOECKT kaj Zlatko TIŠLJAR. Pro tio ni prezentas al la legantoj iliajn iom ampleksajn priesperantajn biografiojn ke vi mem taksu iliajn meritojn.

Flory WITDOECKT:

Mi esperantiĝis en 1988. Tuthazarde mi komencis lerni Esperanton, ie je la 10-a aŭ 11-a leciono de la kurso de portugalo Manuel ALBERTO; do pere de la Cseh-metodo mi sufiĉe rapide lernis la fundamenton de la lingvo. La saman jaron mi partoprenis la 73-an UK-n en Roterdamo. Se tiam mi ankoraŭ ne povis paroli esperante mi tamen komprenis preskaŭ ĉion dum la prelegoj.



Kio ŝanĝis mian vivon? Dum tiu kongreso la renkontiĝo kun tiama profesoro de la Ĉina Akademio de Sciencoj SHEN Ĉengru, ankaŭ ĉefredaktoro de scienca revuo "UNESCO, Impact of Science on Society". Imagu ke li maltrafis sian reflugon al Pekino! Kompreneble Walter kaj mi tuj proponis gastigi lin ĉe ni en Ostendo, ĝis la venonta flugebleco unu semajnon poste. Lia unua surprizo estis ke ne plu estis

landlimo inter Nederlando kaj Belgio (ankaŭ poste li konstatis la samon al Francio). Lia restado en Belgio puŝis nin al vizito al pluraj oficialaj instancoj. Ĵurnalistoj aŭdis pri la ĉina vizito al Ostendo kaj pluraj artikoloj pri Ĉinio kaj Esperanto aperis en diversaj gazetoj! Unu jaron poste okazis la UK de 1989 en Brajtono, kaj ni speciale vojaĝis al Londono por interveni ĉe la Belga Ambassadejo por ke SHEN Ĉengru obtenu sian vizon al Belgio (memoru la Tian-An-Men tragedion en Pekino). Ni entuziasme akceptis lin kaj YU Sailing dum 2 semajnoj, kaj preparis multajn vizitojn al grandaj belgaj internaciaj entreprenoj (Alcatel, Bekaert, Agfa Gevaert, Picanol, ktp). Eĉ la Guvernestro de Okcidenta Flandrio gastigis lin. Je 20.11.1989 la Ĉina Akademio de Sciencoj sendis invitilon por la 3-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto (25-30.majo1990). Ni tre timis pri akiro de vizo, sed kiam en la Ĉina Ambassadejo en Bruselo ni montris la ĉinan invitilon ni tuj ricevis la vizon! Ni do vojaĝis al Pekino kaj tie atendis nin la ĉina profesoro SHEN Ĉengru. Ni loĝis en la Pekina Universitato por Fremdaj Studentoj kaj travivis nekredoblan periodon. Fakte ni estis la solaj *Okcidentanoj* en tiu socialista medio (sekve la Tian-An-Men afero la ĉinaj instancoj rifuzis vizon al okcidentanoj). Sed ni jes renkontis rusojn kaj aliajn esperantistojn el Orienta Eŭropo. Tiun jaron 1990 *El Popola Ĉinio* festis sian 40-an datrevenon, kaj ni ĝoje partoprenis la feston. Esperantistoj el pluraj ĉinaj urboj invitis nin; kaj ni do vizitis belegajn ĉinajn urbojn laŭ la Flava Maro ĝis Shanghai.



Tiuj renkontiĝoj estis la komenco de sukcesa kunlaboro inter Belgio kaj Ĉinio kaj de decido por organizi je 02.09.1991 grandegan eventon en la Kazino-Kursalo de Ostendo "*Ĉinio Aktive*" al kiu partoprenis pli ol 100 grandaj ĉinaj industriaj entreprenoj. Neniu povis kredi ke la motoro de tiu evento estis Esperanto! Kaj en 1992 venis invito de la Ĉina Esperanto-Asocio por partopreni la 5-an Pacifikan

Kongreson de Esperanto en Quindao. Mi organizis karavanon de 8 personoj kaj ni travivis neforgeseblan vojaĝon al belega regiono kaj partoprenis al unika kongreso. Dum tiu kongreso ni ĉeestis memorindan eventon: la japanaj esperantistoj pardonpetis al la ĉinoj por la kruelecoj de la pasinta mondmilito, ankaŭ inter Ĉinio kaj Japanio. Larmoj inundis ĉiujn vizaĝojn! Poste en 1994 ni ankoraŭ vizitis Ĉinion por belga entrepreno pri akvopurigado *Aquasystems*. Kun ĉinaj esperantistoj, specife LI Eruda kiu akompanis nin, ni tiam vizitis plurajn ĉinajn entreprenojn kaj fabrikojn en Shenyang, Tonghua (ĉe la landlimo al Norda Koreio), Yantai, Qingdao, Shanghai kaj Shenzhen. Kia aventuro! La 89-a UK en 2004 en Pekino estis nia lasta vojaĝo al Ĉinio. Sed ĉi-jaron ni en Ostendo organizis la 48-an ILEI-Konferencon kaj ni emocie kaj ĝoje revidis kelkajn el niaj ĉinaj geamikoj.

Intertempe ni ja partoprenis multajn UK-jn kaj certe ĉiujn Eŭropajn kongresojn de EEU (Eŭropa Esperanto-Unio iaspc). Kiel belgoj ni havas apartan ligon al Eŭropa Unio. La unua interŝtata kunlaboro estis BENELUX (Belgio, Nederlando, Luksemburgio) kaj al tio sekvis la unua provo de plilarĝiga eŭropa kunlaboro kun 6 ŝtatoj. Ĉu oni povas kompreni ke la plej grava rezulto de tiu kunlaboro estas la paco? Rezulto kun multe da mankoj kaj problemoj, kompreneble. Sed mi opinias ke paco estas la plej kara trezoro (mi kaj tiuj de mia generacio povas kompari!).

Pro tio mi akceptis la postenon de vicprezidantino de EEU (kaj de kasistino), sub la prezidanteco de Umberto BROCCATELLI. En la jaro 2000, kiam mi estis prezidantino kaj de la Flandra Esperanto-Ligo kaj de la Belga Esperanto-Federacio, mi organizis la 4-an EEU-kongreson en Oostende, sub la alta protektado de Albert la II-a, reĝo de la Belgoj, kaj kun du Honoraj Komitatoj: tiu de Interkulturo kun la Guberniestraro de Okcidenta Flandrio kaj la Urbeŝtato de Oostende (lerneja projekto), kaj tiu de la Kongreso mem kun la tuta Federacia Registaro, la Flandra Registaro kaj 16 belgaj EU-Deputitoj! Tiu kongreso havis apartan prestiĝon ĉar ni sukcesis vojaĝigi la kongresanojn al Bruselo por ĉeesti kunvenon kun kelkaj EU-deputitoj en la Eŭropa Parlamentejo. (Por ne ĝeni la trajnvojaĝantojn, mi devis rezervi sidlokojn en 3 diversaj trajnoj!). Sed ne nur prestiĝa pro tio! Dum la kongreso la kongresanoj povis sekvi tre interesajn prelegojn sur la ŝipo Seastar (veturante laŭlonge de la marbordo de Ostendo al Nieuwpoort) inter aliaj tiun de Maryvonne kaj Bruno ROBINAU, mondvojaĝantoj, kaj de Dro Wim DE SMET pri Delfenoj kaj Balenoj en la Norda Maro. Preskaŭ 500 personoj partoprenis tiun EEU-kongreson kun temo: Ekologio, ŝlosilo por la tria jarmilo! Kaj vere ekologio estis la ĉefa temo de ĉiuj prelegoj.

Jam tiam la prezidanto Umberto BROCCATELLI emis al rezigno de sia posteno. Por sekvi al tiu elstara prezidanto ni malesperis trovi bonan kandidaton. Sed, post plia vana serĉado dum la 5-a EEU-kongreso en Verono, subite envenis en la salonon juna irlanda diplomato Seán Ó RIAIN. "Jen la nova prezidanto de EEU" mi pensis en mi mem! Daŭris pli ol 2 tagojn por persvadi lin, sed finfine Seán akceptis, kaj mi promesis helpi lin en tiu nova funkcio. Nun mi estas ege kontenta ke mi diskutis kun li ĝis lia akcepto!



Dum la 6-a EEU-kongreso en Bilbao (2004), ni ege diskutis pri la nova statuto de EEU kiun mi jam antaŭe prilaboris kun iama belga ambasadoro. Finfine ni bonŝancis ke Brian MOON metis ĉion en bonajn formojn tiel ke mi povis deponi la fondo-dosieron ĉe la belga Ministerio de Justico. Per Reĝa Juĝo la tiama ministrino pri Justico subskribis la satuton la 23-an de majo 2005. Pro ŝanĝoj en ĉiuj administrafakoj al novaj teknologioj, la dosiero estis registrita en la Belga Ŝtatgazeto la 16-an de februaro 2006! Oni povas

mencii tion en kelkaj frazoj, sed en realo estas laboro de 2 jaroj kun korespondadoj kaj pluraj vizitoj al pluraj oficialaj instancoj!

Ĉi tie mi dankas la aliajn EEU-estraranojn pro iliaj laboroj kaj organizo-talentoj en la sekvaj EEU-kongresoj. En tiuj mi nur zorgis kaj registris la financajn movojn kaj la librotendon. Mi

feliĉe povis helpi en ĉiuj gravaj dosieroj ĉe la Eŭropa Komisiono. Se ne ĉiuj dosieroj ricevis eŭropan finanĉan subtenon, tamen la sukcesaj estis granda paŝo antaŭen por EEU. La plej prestiĝa estis lingvo.info (danke al la nelaciga laboro de Maja TIŠLJAR, direktorino de la projektoj).

Tamen kiam komencis la ideo pri pli da atento al la *Eŭropa Himno*, en muziko de la fina parto de la 9-a Simfonio de Ludwig van BEETHOVEN kaj kun la nova Esperanto-teksto de Umberto BROCCATELLI, nova projekto ĝermis en mia kapo. Kial ne sugesti al lokaj korusoj kunpreni tiun version en siajn repertuarojn? Sed unue oni devis montri pri kio temas! Do trovi koruson kiu pretas kanti la Eŭropan Himnon! Tute ne facilas! Mi do kontaktis pli ol 100 gekantistojn de diversaj lokaj korusoj por finfine okazigi kunigan ripetadon. Venis foje 10, foje 15 personoj. Mi preskaŭ malesperis; sed mirakle kiam mi anoncis ke profesia filmisto filmos la tutan aferon, je la fiksita dato alvenis 40 gekantistoj!!!



Kaj nun? Produkti DVD-n? Nur kun la *Himno* kiu daŭras 3 minutojn? Ne evidentas; kaj mi do decidis aldoni plian valoron: kelkajn bildojn kaj melodisonojn de la 28 EU-membroŝtatoj por atingi prezentadon de ĉirkaŭ 30 minutoj. Sed tiam komencis la problemoj: kiaj muzikoj, kiaj bildoj ĉar preskaŭ ĉio trovebla en la reto estas sub kopirajtoj! Por la muziko juna arkitekto trovis taŭgajn fontojn, kaj por la bildoj mi devis peti la esperantistaron al helpo per propraj fotoj. Finfine ĉio estas en ordo, kaj en la komenco de la DVD mi aldonis kelkajn ostendajn bildojn por montri kie La Ostenda Koruso prezentis la kantadon (nur 3 esperantistoj kune kantas!).

Pli frue en tiu artikolo mi parolis pri la 48-a ILEI-Konferenco, en kiu mi estis vicprezidantino de la LKK. En Ostendo ni uzis ĉiujn niajn rilatojn por obteni la plej fruktodonajn avantaĝojn je ĉiu nivelo, ĉu financa ĉu organiza. Sed tion oni ne obtenas

sen daŭra kunlaboro kun la diversaj urbaj instancoj. Foje ĵurnalisto demandis al mi en kiu asocio aŭ organizo mi *ne membras*. Efektive oni devas koni la homojn por pli bone organizi aferojn. Kaj ĉi fojon mi sukcesis organizi grandan Centro-feston kun mondaj lingvoj kaj koloroj en unu el la plej belaj placoj de Ostendo. Mi obtenis la kunlaboron de pluraj lokaj organizoj de fremdaj urbanejoj el diversaj kontinentoj (kelkaj eĉ interkonatiĝis kun ILEI-konferencanoj: ekz. el Nepalo!). Estis unika etoso kun granda muzikfanfaro kaj tuta Baletlernejo. Kaj kompreneble la fremdaj ostendanoj, en siaj tradiciaj vestaĵoj, vendis ekzotikajn trinkaĵojn kaj manĝejaĵojn el siaj landoj al la multegaj vizitantoj! Inter la ILEI-konferencanoj estis Jean Bosco MALANDA, el Kinshasa (Kongo) kun kiu ni jam antaŭe havis bonajn rilatojn danke al Esperanto. En julio 2009 (ĵus antaŭ la 94-a UK en Bjalistoko) ni vizitis lin kaj aliajn kongajn esperantistojn kaj E°-klubojn en Matadi, Boma, Muanda, ktp. Denove por ni estis neforgesebla malkovro de nekonata kontinento kaj belega naturo. Kaj ni povis konstati kiel niaj helpagadoj faris la diferencon en la ĉiutaga vivo de la afrikanoj (pri tiuj agadoj mi povus verki multon, sed ne havas la tempon!). La ILEI-konferenco en Ostendo estis por ni feliĉa evento por revidi amikojn el la tuta mondo!

Mi ĉiam klopodas enkonduki Esperanton je ĉiu okazo. Tiel ke kiam mi volontulas en malsanulejo, preskaŭ ĉiun fojon oni rekonas min "Vi parolas Esperanton, ĉu?" Samas en la aliaj asocioj en kiuj mi membras (biciklado, projektoj en la globala sudo, helpo al memstaruloj, fiskala studado, korusoj, ktp, ktp). Ni diru ke en Ostendo Esperanto estas konata fenomeno!

Zlatko TIŠLJAR:



La 31-an de januaro 1962 mi frapis al la pordo de Kroatia Esperanto-Ligo en Zagrebo (Amruševa 5) kaj renkontis unuan vivan esperantiston – Jelena Manojlović. Kvankam mi mem komencis lerni Esperanton kelkajn monatojn pli frue, mi konsideras tiun ĉi daton kiel komencon de mia esperantistiĝo. Sekve mi movadumas jam 53 jarojn. Mi vere okupiĝis pri treege multaj aspektoj de la Movado kaj estas ege multaj kampoj de mia aktiva kontribuo inter kiuj multajn mi eĉ forgesis. Mi okupiĝis praktike de 1972 profesie pri

Esperanto, do ĉiutage, kaj tial ne estas mirinda la kvanto da agadoj efektivigitaj. Do, ĉi tie mi notos almenaŭ la plej gravajn aktivecojn, prezentante iaspecan biografion rilate la E-agadon.

I. Miaj funkcioj en la movado:

1. 1962-66: estrarano de Studenta E-klubo en Zagrebo
2. 1966-69: prezidanto de SEK en Zagrebo
3. 1969-1978 prezidanto de Jugoslavia E-Junulara Asocio (JEJA)
4. 1972-1977 sekretario de Kroatia E-Junulara Asocio (KEJA)
5. 1972-1992 direktoro de la entrepreno Internacia Kultura Servo en Zagrebo (IKS)
6. 1977-79 Unua prezidanto kaj fondinto de la E-societo Velika Gorica
7. 1978-1997 membro de la komitato de UEA
8. 1992-2009 direktoro de la entrepreno Inter-kulturo en Maribor
9. 2004-.... Sekretario de Eŭropa E-Unio
10. 1996-.... Sekretario de Asocio por Eŭropa Konscio en Maribor
11. 1996-... membro de la estraro de la E-societo en Maribor (Slovenio)
12. 1983-1984 sekretario de Jugoslavia E-Ligo
13. 1985-1988 prezidanto de Zagreba E-Ligo
14. 1989-1993 sekretario de Alp-Adria E-organizaĵo
15. 2000-.... prezidanto de Societo por Eŭropa Konscio en Velika Gorica (Kroatio)

II. Pedagogia kampo:

- a) Kunordigado kaj ĉefaŭtorado de la Zagrebmetoda lernolibro (1978-...). Ĝis nun aperis la libro en pli ol 35 lingvoj kaj la kroata eldono en 9 eldonoj je pli ol 50.000 ekzempleroj, eksperimento pri rapida 3-taga lernado en Zagrebo en 1983 por 300 partoprenantoj.
- b) Aŭtoro de Frekvencmorfemaro de parolata Esperanto (baze de diplomlaboraĵo ĉe la

Filoziofia Fakultato en Zagrebo) aperinta libroforme en Zagrebo en 1982 surbaze de kiu estis kreita la Zagreba metodo kaj ankoraŭ nuntempe estas la ununura morfemfrekvenca materialo pri PAROLATA lingvo,

c) Verkinto de Instrucliaro por la instruistoj uzantaj la ZM-on,

d) Gvidanto de bazaj kursoj ekde 1964 (laŭtakse inter 150 kaj 200 kursoj por ĉiuj generacioj (infanoj 7-jaraj ĝis maljunuloj, en lernejoj, popoluniversitatoj, E-sidejoj, privataj loĝejoj kaj en almenaŭ 6 landoj (Kroatio, Slovenio, Aŭstrio, Germanio, Hispanio, Francio...)). Mi taksas ke mi estis instruisto de E al proksimume 2000 personoj.

e) Gvidanto de progresigaj kursoj kaj literaturaj (deko da tiaj kursoj en Zagrebo kaj Maribor),



f) Patro de du denaskaj filinoj, Maja kaj Danka (denaska edukado de la filinoj en Esperanto) kiuj ankaŭ nun kiel plenkreskaj estas tre bonaj parolantinoj kaj ankaŭ aktivantoj en la Movado.

g) Aŭtoro de vortaroj: mallonga 5000 vorta E-kroata vortaro (7 eldonoj) kaj 5000-vorta E-slovena kaj sloven-Esperanta vortaro (kune kun A. Herman).

Kursanoj de daŭriga kurso en Maribor

III. Verka laboro:

Mi verkis kaj aperigis la jenajn originalajn librojn:

1. Duobla Spiralo (eseoj pri etikaj demandoj, utilaj por adoleskuloj)
2. Eŭropa Ideologio (eseoj pri Eŭropaj demandoj), aperis ankaŭ en la slovena kaj la kroata lingvoj.
3. Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj (eseoj pri la E-movado)
4. Eŭropo, vi baldaŭ mortos (eseoj pri lingvaj demandoj en Eŭropo), aperis ankaŭ en slovena traduko,
5. lernolibroj, vortaroj, instrucliaroj menciitaj en la supra pripedagogia agado
6. EKZISTADO (kibernetika klarigo pri la mondo)
7. Nekutime pri multio (eseoj pri politikaj kaj aliaj aferoj verkitaj dum la lastaj 20 jaroj)
- 8 Internacia Kiso (studo pri 25 jaroj de Drama grupo de Studenta E-Klubo en Zagrebo)

IV. Tradukista laboro:

1. Tradukis la romanon de Miroslav Krleža »Rande de l' prudento« el la kroata al E, la dramon de la sama aŭtoro »Sanktreĝa festo« kaj kelkajn liajn novelojn kaj poemojn,
2. Tradukis la romanon de Joža Horvat »Wakajtapu« el la kroata al E,
3. Tradukis novelaron de Tone Partljič el la slovena al E »Mi volis tuŝi la sunon«,
4. Tradukis 4 novelojn el la originala E al la kroata por antologieto de E-literaturo en la kroata,
5. Tradukis multajn tekstojn por la drama grupo de SEK kaj unuopajn poemojn por diversaj okazoj el la kroata al E.

IV. Pupteatro kaj kultura agado:

Ĉefinicianto (kune kun Tibor Sekelj kaj Roger Imbert) de la Pupteatra Internacia Festivalo en Zagrebo (Festivalo de profesiaj pupteatroj) kaj ties gvidanto de la komenco en 1968 ĝis 1991 dum kiu en la festivalo partoprenis pli ol 150 profesiaj pupteatroj inter kiuj 70% ludis en



Esperanto kaj dudeko da pupteatraĵoj estis televide filmitaj kaj publike prezentitaj en Esperanto en la kroata televido. Okazis ankaŭ apartaj turneoj de pupteatroj kun pli ol 50 prezentadoj ĉefe en Jugoslavio sed ankaŭ en Norvegio kaj Danlando. Unuopaj pupteatroj post la festivaloj ofte prezentis la teatraĵojn en sialandaj E-aranĝoj kaj kongresoj.

Dum Kataluna E-kongreso

Organize gvidis en la kroata urbo Pula tri festivalojn de profesiaj teatroj 1968, 1970 kaj 1973. En Zagrebo okazis en 1987 manifestaĵo »100 jaroj de E-.kulturo« kun pupteatra kaj teatra festivalo, granda muzika koncerto kaj sociologia simpozio kaj kun pli ol 500 partoprenantoj, kies organzon mi gvidis.

Mi aktoris en dudeko da teatraĵoj reĝisortitaj de Mladen Ŝerment en la Drama grupo de Studenta E-Klubo en Zagrebo inter 1963 kaj 1982. (pri tio detale en la libro Internacia Kiso).

V. ORGANIZA KAJ LIBROELDONA AGADO

V.a) En Zagrebo kadre de Internacia Kultura Servo:

Krom la jam menciita pupteatra kaj teatra agado en IKS sub mia redaktado aperis pli ol 50 libroj en Esperanto kaj kelkaj en la kroata.

IKS organizis kaj iniciatis aŭ profesie subtenis aron da E-kongresoj, simpozioj sciencaj, konferencoj en Kroatio. Inter la plej gravaj estas organizo de TEJO-kongreso en Zagrebo en 1988, 5 sciencaj simpozioj en Kumrovec kaj Zagrebo de 1977 ĝis 1990, multaj semajnoj dediĉitaj al diversaj landaj kulturoj (Tagoj de kulturo...), multaj kursoj de E en lernejoj elementaj kaj en la propraj ejoj de IKS. Ellaboro de la zagreba lernolibro kaj 8 ĝiaj eldonoj je 40.000 ekzempleroj, seminarioj por instruistoj en Kroatio kaj Aŭstrio, landaj konferencoj de KEJA kaj KEL, eldonado kaj kunredaktado de la revuoj en Kroatio (TEMPO 1980-1990), OVO, de 84-85...bultenoj de KEL. Internacia Kultura Servo dum mia direktorado ekde la fondiĝo en 1972 kun 3 salajrataj oficistoj kreskis ĝis 11 salajrataj oficistoj en 1991 kiam mi ĝin forlasis pro la milito en Kroatio. En 2001 Simpozio de lingvistoj en Zagrebo pri eŭropa lingva problemoj.

V.b) En Maribor: organizo de SAT-kongreso en Maribor, Alp-Adria konferenco en Maribor, 2 sciencaj simpozioj en Maribor kaj Graz (Aŭstrio), 3 puĉtataraj festivaloj en Klagenfurt (Aŭstrio), iniciato kaj starigo de strata festivalo La Strada en Graz (Aŭstrio), 6 video-filmfestivaloj de E-filmoj en Maribor, 20 libroj en Esperanto kaj deko en la slovena (2 el infanlibroj ricevis premion: Infanlibro de la jaro de UEA). De 1993-95 mi organizis kaj efektivigis propedeŭtikan eksperimenton pri E en 5 lernejoj de Slovenio, Aŭstrio kaj Kroatio (tri el la kursoj en Slovenio kaj Aŭstrio mi mem gvidis) kaj poste ellaboris raporton baze de kiu mi magistriĝis ĉe Akademio Internacia de Sciencoj San Marino. Kaj la plej granda afero



estis organizo de Eŭropa E-kongreso en Maribor 2007 kun partopreno de 250 kongresanoj el 30 landoj, partopreno de du eŭropaj parlamentaninoj, simpozio kaj konferenco... Mi estis la prezidanto de LKK.

Estrarkunsido de EEU en Bruselo 2010

VI. ARTIKOLOJ KAJ REDAKTADOJ

Ekde 1963 kiam mi aperigis la unuajn artikolojn en la Bulteno de SEK kaj redaktis ĝin dum 3 jaroj, mi aperigis plurcenton da artikoloj en E en tre diversaj gazetoj (Heroldo, E-revuo, Monato, Tempo, Jes, sed, IOE-gazeto (poste Esperanto-gazeto), La Ondo de Esperanto, Eŭropa Bulteno, El Popola Ĉinio, Internacia Pedagogia Revuo....)

Redaktas de 2009 Eŭropan Bultenon kaj kunredaktis Zagrebajn revuetojn »Jes, sed« kaj »Tempo«.

Sciencaj artikoloj pri kibernetikaj kaj pedagogiaj: Aperis almenaŭ 20 artikoloj en diversaj sciencaj revuoj kaj kolektoj de simpozioj en kiuj mi prelegis kaj tri el ili en mia libro »Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj«.

VII. Partopreno en Eŭropaj projektoj financataj de EU

Mi aŭtoris ekde 1994 ok eŭropajn projektojn financatajn de EU per sume ĉirkaŭ 400.000 eŭroj: La unua tia projekto estis serio de prelegoj pri diskriminacio en Maribor 94-95, poste kadre de EU-programo PHARE por la Maribora Popoluniversitato »Dulingva edukado de romaoj« pro kiu mi en 2000 partoprenis en eŭropa konferenco pri romaoj en Bruselo - kaj »Virinoj por politiko kaj demokratio« en 97 kaj 98, Lingva festivalo en Maribor 2003-2005, projektoj de EEU Alieco kiel valoro 2007-2008 en Maribor, Kia estus Eŭropo sen EU (2011-12) en Triesto, projekto "Tri eŭropaj infanlibroj en Hindujo kaj unu bengala en Eŭropo" por Kroatia E-Ligo (2009-2011), ellaboro de peto kaj gajno de regula subvencio por EEU por 2008.

Krome mi partoprenis en minimume dek projektoj financataj de EU kiujn mi mem ne aŭtoris sed mia organizaĵo (ĉu Popoluniversitato de Maribor, ĉu Inter-kulturo, ĉu Asocio por Eŭropa Konscio) estis partnero inter kiuj por mi la plej gravaj estas »Eŭropajn valorojn peri« (2006-2008) kies rezulto estas la paĝaro pri eŭropaj valoroj www.wix.com/dtisljar/eŭropo kaj Lingvo.info.

VIII. INFORMA PUBLIKMEDIA AGADO

Rilate al ĉiuj supraj agadoj estis paralela informado al neesperantistaj medioj. La plej kvalita kaj sistema okazis dum la aktivado de IKS en Zagrebo (72-91), pro kiu en Kroatio ne ekzistas negativa rilato al E kaj preskaŭ ĉiuj civitanoj scias kio estas Esperanto. Dum tiu periodo estis ne nur 20-o da pupteatraĵoj elsenditaj en E en la kroata televido sed ankaŭ amaso da intervjuaĵoj, raportaĵoj, eĉ televida tutlanda kvizo dediĉita al E, informoj en tagĵurnaloj (dum du jaroj eĉ regulaj rubrikoj pri E en Veĉernji list, felietona serio pri E en la sama gazeto (ĉefa tagĵurnalo de Zagrebo) kaj en Radničke novine, artikoloj kaj felietonoj en infanaj revuoj (Tina), en semajnrevuoj, sennombraj radio-elsendoj ĉiuspecaj en Zagrebo... (ekz. dum la TEJO-kongreso en Zagrebo tri lokaj radio-elsendoj ĉiutage havis rubrikojn (unu en Esperanto kaj du en la kroata). Simile okazis en Maribor de post 1992 kun multaj artikoloj en Veĉer, intervjuaĵoj eĉ radioj kaj slovena televido (la plej longan TV-intervjuon mi havis en loka TV-elsendo en



2010 dum daŭro de unu horo). Mi estis intervjuata ankaŭ en kelkaj aliaj landoj (Aŭstrio okaze de la Klagenfurta Pupteatra Festivalo kaj Graza simpozio pri familioj, en Bosnio/Hercegovino okaze de partopreno en simpozio pri 100 jaroj de E en tiu lando kaj en kelkaj aliaj landoj dum partopreno en kongresoj (Katalunio, Hungario...)

Kun la eksprezidantoj de kroatio (Mesić) kaj Slovenio (Kučan) en Triesto 2012

IX. PRELEGADO

Dum la tuta 50-jara aktivado mi ĉiujare publike prelegis ĉu pri E al neesperantista publiko ĉu dum multaj E-aranĝoj pri tre diversaj temoj. Mi ne notis, sed estis inter 10 kaj 20 prelegoj jare kaj entute dum 50 jaroj pli ol 500. Ankaŭ nuntempe mi ŝatas prelegi kaj multaj invitas min. En juna aĝo mi partoprenis en kvino da Oratoraj Konkursoj de TEJO kaj en Tyresoe (Svedio) mi eĉ venkis.

X. REFOJ kaj KONGRESOJ

Inter 1980 kaj 1994 mi regule partoprenis en Renkontiĝoj de E-Familioj (REF) kun miaj du filinoj kaj edzino. Mi mem organizis 2 el la REFOj (en 1985 sur insulo Pag en Kroatio) kaj en 1993 en Maribor (Slovenio). Mi verkis kelkajn artikolojn pri la fenomeno de denaskaj infanoj kaj kunkreis la politikon de REFOj en tiuj jaroj.

Ekde mia unua UK en Sofio en 1963 kaj IJK en Vraca samjare mi partoprenis en trideko de UKoj kaj pluraj IJKoj, kelkaj SAT-kongresoj, 8 EEU-kongresoj kaj almenaŭ 20 naciaj E-kongresoj.

RESPONDE AL ANTONIO DEL BARRIO

Sukcesa agado de EEU dum la lastaj 10 jaroj (multaj kontaktoj kun Eŭropa Parlamento, Eŭropa Komisiono, aliaj gravaj politikistoj kiel ŝtatprezidantoj de Kroatio, Irlando, Slovenio, atingitaj projektoj kaj financado far EU en sumo de preskaŭ miliono da eŭroj, agado en Platformo por neregistaraj organizoj por multlingvismo) okazis dank' al la nuna politiko de EEU kiu celas klarigi al gravuloj ke Esperanto povus esti grava solvo por lingva problemo en EU. Kaj la estraro ne renkontis ĝis nun kontraŭstaron de ne-esperantistoj al tiu agado kaj celado. Se iu volas ŝanĝi tiun politikon, estas tasko por li/ŝi unue klare montri kiel iu ajn alternativa politiko povus sukcesi. Kaj intertempe, akcepti demokratian decidon kaj pagi sian kotizon bonorde.

La Eŭropa Bulteno ĉiam estas esprimilo de personaj opinioj de la aŭtoroj. Neniu en la estraro kontrolas ĝin antaŭ aperigo por aprobi aŭ ne aprobi ĝian enhavon. Se la estraro faros ian deklaron, tio estos klare indikita kiel deklaro de la estraro – ĉio alia estas de la aŭtoro kiu subskribas la artikolon.

Estonte estos klare notite en ĉiu numero, ke pri la opinioj esprimitaj en la artikoloj respondecas la aŭtoroj.

Seán Ó RIAIN

NOVA LINGVOINSTRUA PROJEKTO KUN E@I: LERNU LA ĈEĤAN LINGVON!

Komence de septembro estis lanĉita sekva el la lingvoinstruaj retejoj, en kiuj E@I kunlaboras. Ĉi-foje temas pri instruado de la ĉeĥa lingvo, kiun oni povas eklerni en la paĝaro www.mluvtecesky.net (mluvte česky = parolu ĉeĥe).

La projekto „CZKey“ estis subtenita de la ĉeĥa nacia agentejo de la EU-programo „Erasmus+“, enkadre de la projekto Leonardo. Temis pri 2-jara projekto pri „transpreno de novigo/noveco“, de la antaŭa projekto de E@I „slovake.eu“. La paĝaro pri la slovaka lingvo ekplaĉis al la ĉeĥaj instruistoj de la ĉeĥa, kaj surbaze de la antaŭa kunlaboro ankaŭ pri la germana retejo deutsch.info (pri kiu nun okazas plia paŝo de ties evoluo, kun pretigado de nova enhavo kaj aplikaĵoj) oni en Brno decidis, ke estus tre bone, se ankaŭ la ĉeĥan lingvon oni povus lerni rete, multlingve kaj senpage. La tuton kunordigis *Centro de lingva edukado de Universitato de Masaryk en Brno*, en kiu ankaŭ laboras Marek Blahuš, kiu ankaŭ aktive kunlaboris pri la projekto. Entute pri la projekto laboris kvin partneroj el Ĉeĥio, Slovakio, Germanio, Aŭstrio kaj Pollando, kaj fakte en 3 el ili estis envolvitaj esperantistoj kaj eblas eĉ rekte diri, ke la projekto mem ekestis danke al Esperanto.

La paĝaro instruas la ĉeĥan lingvon tre bunte kaj abunde: unue troviĝas baza kurso, ekde tuta komencanta nivelo A1 kaj A2, aldone riĉa trarigardo de gramatiko. Sekve estas aldonita parto

de B niveloj, kiu jam estas speciale orientita al la „medicina ĉeĥa“, pro la fakto, ke la universitato en Brno instruas medicinajn studentojn de eksterlando, kiuj bezonas ĝuste tian vortprovizion lerni plej urĝe. La kurso estas akompananta kun multaj ekzercoj, sep horoj da aŭdiomaterialoj kaj tre praktika vortaro. En la retejo ankaŭ troviĝas multlingva diskutforumo kaj aldone buntaj informoj pri Ĉeĥio.



La paĝaro mem estas havebla nun en kvin lingvoj: la ĉeĥa, slovaka, pola, germana kaj angla. Preparaĝas la rusa versio, pripensataj estas kelkaj aliaj. La esperanto-versio ankoraŭ ne ekzistas – ĉefe temas pri tempa kaj persona manko: la enhavo de la retejo konsistas el preskaŭ 350 paĝoj da teksto – kio estas enorma kvanto, por fari ĝin de volontulo/j. Ĝis nun ni ne sukcesis trovi taŭĝa/jn homo/jn en Ĉeĥio, kiuj pretus helpi pri la paĝaro kaj E-igi ĝin. La sistemo estas tamen kreita tiel, ke eblu aldoni ajnan lingvon al la paĝaro, do kompreneble EO versio estus tre bonvena.

Sekva en la vico de lingvoj, pri kiuj nun E@I okupiĝas estas la rusa – jam venontjare espereble aperos beta-versio de la paĝaro ankaŭ por tiu ĉi lingvo, kadre de la EU-projekto „Russian Online“.

Novaĵojn pri la retejo kaj ankaŭ pri la ĉeĥa lingvo ĝenerale eblas sekvi ankaŭ en Facebook: www.facebook.com/mluvtecesky.net.

Peter Baláž (Petro), E@I-kunordiganto

LA HELENA POPOLMUZIKO ESTAS “ESPERANTO DE LA GREKOJ”

La juna, grava kaj tre populara muzikisto-gitaristo Dimitris Mistakidis, el Tesaloniko, baldaŭ lanĉos sian novan muzik-laboron, nomatan “Esperanto”, konsistantan el 16 tre konataj al la greka publiko, malnovaj kantoj, en nova, moderna formo. La kantojn prezentos plej amataj, vaste konataj, enlande kaj eksterlande, grekaj kantistoj. La tre interesan muzikeventon la kreinto prezentis la 10-an kaj la 17-an de oktobro en la “Vitra Muzika Teatro” (centro de Ateno). Post iom da tempo estos eldonita la samnoma disko.

La aŭtoro en sia intervjuo eksplikas pri la titolo “Esperanto” jenon: “Esperanto estas la komuna lingvo kiu estis kreita por ke la homoj povu interkompreniĝi, do mi kredas ke la greka popolmuziko estas komuna lingvo de ĉiuj Grekoj”.

Kostas Kiriakos

SUKCESE FINIĜIS LA DUJARA GRUNDTVIG-PROJEKTO

En la pasintaj du jaroj kvar Esperanto-organizaĵoj partoprenis la Grundtvig-projekton "Kultura diverseco kaj multlingvismo de Eŭropo - kiel lerni pri ili?".

La kunlaborantoj estis

- Centro de Interkultura Edukado (CEM) (Pollando – Nowy Sącz),
- Fondaĵo Edukado.net (Hago, Nederlando)
- Filio de Germana Esperanto-Asocio por Klerigado kaj Kulturo (Germanio-Herzberg am Harz) kaj
- Kultura Esperanto-Asocio (KEA) (Hungario-Budapeŝto).

La ĉefa celo de la projekto estis ekkonigi unu al la aliaj la multkulturecon de la partoprenantaj landoj, folklorajn kaj tradiciajn kutimojn, la historion, kulturon, lingvon kaj popolarton de specifaj minoritatoj kiel ekzemple en Nederlando la frisoj aŭ en Pollando la sileziaj popoloj. Krom la reciprokaj vizitoj, organizado de seminarioj kaj kulturaj eventoj, el la projekto kreiĝis utilaj kaj instruigaj novaj produktoj. Tiuj estas ekzemple:

- resuma raportfilmo kaj aliaj filmoj pri la eroj, seminarioj kaj programoj
- kvar retaj kursoj kun entute 25 lecionoj, rilataj al la projektotemoj de la partoprenantoj:
- Nederlando: pri la frisaj kulturo kaj lingvo (10 lecionoj)
- Pollando: kristnaskaj kutimoj kaj sudpolaj etnoj (5 lecionoj)
- Germanio: turismaj lokoj, popoltradicioj en la Harz-montaro (8 lecionoj)
- Hungario pri la vinkultivado kaj folkloro vilaĝo Buzsák (2 lecionoj).

La retaj kursoj troveblas kaj sekveblas ĉe la klerigejo de edukado.net: <http://edukado.net/klerigejo>

Ili povas servi ankaŭ kiel kursmaterialoj kaj por tiucela utiligo Katalin Kováts kompilis detalan metodikan gvidilon kun konsiloj kaj ekzemploj pri la uzo.

La germana partnero kune kun la aliaj produktis broŝuron pri la tipaj kristnaskaj kantoj kaj tipaj manĝaĵoj de la kunagantaj landoj. Utila produkto estas ankaŭ la broŝuro kun konsiloj pri

edukado de junuloj al ekkono kaj rilato kun diverskulturaj popoloj kaj kulturoj.

Por la partoprenantoj estis speciala ĝojo, ke la nederlanda partnero edukado.net involvis en la projekton la du frisajn Esperanto-muzikgrupojn Kapriol' kaj Kajto, kies ses membroj kunagadis kaj partoprenis kun koncertoj, ĉiĉeronado en Frislando kaj ellaborado de kursmaterialoj. Rekompence la Fondaĵo Edukado.net finance helpis al la eldono de nova KD de Kapriol', kaj tiel kontribuis al la konservado de gravaj plurjarcentaj kantoj de tiu minoritata kulturo.

Dum la projektoperiodo la partoprenantoj sesfoje renkontiĝis, multon spertis kaj lernis, rezulte pluroble plenumis la entreprenitajn taskojn. Tiom diligente kaj multe ili agis, ke nur por la raportado pri ĉiuj eroj ili bezonis plurajn semajnojn. Nun estas alŝutitaj ĉiuj Esperanto-lingvaj produktoj al la eŭropunia datumbazo "European Shared Treasure" http://www.europeansharedtreasure.eu/detail.php?id_project_base=2013-1-PL1-GRU06-38757, kie interesiĝantoj povas trovi ilin kaj vidi kion ebligis al ni Esperanto kaj la kunlaboro ene de tiu lingvo. Necesas menciigi, ke por la raportado ni havis lingvopolitikajn malfacilaĵojn, ĉar en la retaj raportformularoj de EU ne eblis elekti Esperanton, sed ni kaptis ĉiun okazon por protesti kontraŭ tio kaj atentigi niajn naciajn agentejojn pri la utila peril-funkcio de nia lingvo. La akumulitajn spertojn kaj materialojn, inklude la detalajn raportojn, esperantistoj povas trovi en du retaj kolektoj de la projekto, kie ni konsilas orientiĝi laŭ la ligoj kaj subĉapitroj.

Ni estos feliĉaj se vi informiĝos pri la projekto, vizitos la albumojn, spektos la filmojn kaj kleriĝos pere de niaj kursoj. Pliajn informojn trovu ĉe la projektopaĝo ĉe edukado.net: <http://edukado.net/grundtvig> kaj ĉe la oficiala projektopaĝo: <http://kulturdiverseco.esperanto-urbo.de/> Por ekhavi superrigardon pri la projekto ni konsilas unue spekti la resumfilmon: <https://youtu.be/1QX1k453T50>

Katalin Kováts,
redaktoro kaj projektodirektoro en la nederlanda flanko

EŬROPA LINGVA TAGO EN BRUSELO

“La Europa Komisiono invitis min, kiel prezidanton de EEU, al la Europa Tago de Lingvoj en Bruselo la 25-an de septembro 2015. Matene estis plenarsesio kun multaj prezentoj, kaj posttagmeze estis 4 laborgrupoj. Mi partoprenis la laborgrupon pri lingvolernado kaj trovis eblecon mallonge prezenti la lernfaciligajn ecojn de Esperanto, aparte la britan programon “Springboard”. La ĉeestantaro ne aŭdis pri tiu aliro antaŭe, kaj multaj montris intereson. Aparte interesighis profesoro David Little el Irlando, kaj li petis ekzempleron de la libro de Angela Tellier pri Springboard. Kun plezuro mi donacis la libron al li. Antaŭ la evento montriĝis etaj prezentoj en ĉiuj 24 oficialaj lingvoj de EU. La prezentantino de la irlanda ne estis denaska parolanto, kaj fakte havis malĝustan elparolon, forte influita de ŝia denaska angla. Ŝi diris irlande ke la Komisiono “ne subtenas artefaritajn lingvojn, ĉar ili ne havas kulturon” – por pruvi ke la ŝ ankoraŭ ne legis www.lingvo.info, kaj tial nenion komprenis pri Esperanto. Ni ankoraŭ havas laboron, por informi kaj eduki tiajn homojn.

Seán Ó Riain

10-A TORPEDO EN HERZBERG AM HARZ



La dekan fojon okazis la Tradicia Oktobra Renkontiĝo Pedagogia (mallonge: TORPEDo) en Herzberg am Harz, inter la 29-a de septembro kaj 8-a de oktobro 2015, organizita de la Esperanto-Centro (Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo) kaj AGEI (Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj), gvidita de Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy.

La ĉefa celo estis instrukapbligo: lertigi instruemulojn kaj ekipi ilin per scio pri taŭgaj instrumentoj, didaktikaj konsiloj, instrumaterialoj, helpiloj, ludoj, ktp. por efika instruado de Esperanto ĉu en lernejoj aŭ movadaj kursoj, ĉu en klubkunvenoj. La faka programo realiĝis en metieja laborformo por individua aŭ et-grupa taskosolvado, diskutado, spertinterŝanĝo. La trejnadon helpis la rekta atingo de fakliteraturo, trarigardeblo de lernolibroj kaj praktika uzado de instruhelpiloj en la biblioteko de la Esperanto-Centro.

La internacia partoprenantaro (12 personoj) ĝuis ankaŭ la libertempajn aktivaĵojn, renkontiĝon kun Esperanto-klubanoj en Herzberg, vizitojn al historiaj urboj, vidindaĵojn en la regiono kaj ekskursojn en la Harz-montaro.

Por informoj pri trejneblo kaj datoj de trejnsesioj en 2016 bv. kontakti nin per <http://esperanto-urbo.de>

Zsofia Korody

ESPERANTO – LINGVO SEN LIMOJ – EKSPozICIO EN KRAKOVO

En Krakovo, Pollando, la Biblioteko de Jagelona Universitato organizis ekspozicion "Esperanto - lingvo sen limoj". Kraków, strato Oleandry 3.

La ekspozicio okazas inter la 20-a de oktobro kaj 10-a de novembro 2015, en la Jagelona Biblioteko (1364-), la ĉefa biblioteko de la Jagelona Universitato en Krakovo.

Tiu institucio estas grava, ĉar ĝi havas statuson de nacia biblioteko. Ĝi estas grava ankaŭ pro la valoro de grandega kolekto da libroj, manuskriptoj k.a. Inter la manuskriptoj troviĝas la verko konsiderata kiel la plej revolucieca libro en la tuta moderna epoko, *De revolutionibus orbium coelestium* de Mikołaj Kopernik (Nikolao Kopernik studis astronomion en tiu ĉi universitato).

La ekspozicion konsistigas parto de la t.n. senata ekspozicio (paneloj, grandparte pri la historio de E-o), migranta tra polaj urboj; libroj el la tre riĉa esp. kolekto de la biblioteko mem; eldonaĵoj kaj gazetoj de kelkaj esperantistoj; ekspozicioj pri la agado de la Studenta Scienca E-Rondo de la koncerna universitato kaj de TEJO, kaj ekspozicieto de esperantaj T-ĉemizoj de tiuj du junularaj organizaĵoj.



Krakovo - "Ekspozicio "Esperanto – lingvo-sen limoj", Foto A. Sochacki

La inaŭguro de la ekspozicio, la 20-an de oktobro, estis riĉa kaj tre bonetosa, frukto de la tuta bona kunlaboro de esperantistoj kaj la biblioteko. La inaŭguran festadon akompanis publika leciono (kiun gvidis la subskribintino de tiu ĉi teksto), intense enkondukanta neesperantistojn en la lingvon, kun priesperanta kvizo, premioj k.a. La programon de la publika leciono, materialojn kaj eble filmeton la gvidintino

intencas poste dividi kun vi.

Antaŭdankante pro la leciono de E-o, la Jagelona Biblioteko prilaboris kaj presis ankaŭ apartan grandformatan afiŝon (100x70 cm) pri la konstanta kaj pri la planata por la komenciĝanta universitata jaro E-instruado en la Jagelona Universitato. La afiŝego troviĝas en tre videbla loko, ĉe la enirejo de la biblioteka domego.

La Jagelona Biblioteko donas grandan atenton al la ekspozicio. Dum la inaŭguro prelegis pri la valoro de E-o la direktoro de la biblioteko. Oni tostis omaĝe al Zamenhof. Avantaĝe, la ekspozicio troviĝas en parto de la granda, plurfunkcia halo teretaĝa, kiun trairas ĉiu alvenanto.

Maria Majerczak

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de oktobro 2015

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Chuck Smith, Seán Ó Riain, Flory Witdoeck, Zlatko Tišljar, Peter Baláž, Kostas Kiriakos, Katalin Kováts, Zsofia Korody, Maria Majerczak

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

